# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Aprilo : 3 2022

## KONFIRMI LA PROPRAN IDENTENCON ANTAŬ OL MONIGI LOTERI-BILETON

En Belgio, 28-jaraĝa alĝera enmigrinto gajnis 270.000 eŭrojn en la nacia lotado de tiu eŭropa ŝtato. Nuntempe, li klopodas ricevi tiun monon, tamen ne temas pri facila afero, ĉar unue li devos konfirmi sian propran identecon.

La gajnanto de la lotado ne troviĝas laŭleĝe en Belgio, pro tio, li unuamomente petis al tri amikoj depostuli la monon. Pro suspektoj, polico arestis ilin sub la akuzo provi rabi tiun monon. Fine, la alĝera junulo ĉeestis la policejon, akompanita de advokato, tiam polico liberigis tiujn tri junulojn, ĉar pruvite, ke ili neniam celis rabi la monon, sed helpi sian amikon, kiu certe ne povus postuli la premion.

La advokato sciigis, ke la junulo ne havas permeson por resti en Belgio, do li ne rajtas disponi banko-konton. Li eĉ ne havas dokumentojn kiuj ebligus identigi lin, ofte enmigrintoj detruas tiujn dokumentojn por malfaciligi eblan forpelon kaj revenigon al sia patr-lando, se polico arestas ilin.




Loteri-bileto de la *Belgium Lotto*

La advokato same informis, ke li celas konfirmi sian identecon kaj pro tio, li jam kontaktis kun familianoj en Alĝerio por atingi la necesan dokumentaron.

La bileton li aĉetis en la belga urbo *Zeebrugge*, haven-urbo kie renkontiĝas multaj enmigrintoj dezirantaj transiri en Brition. Belgaj aŭtoritatuloj permesas al li resti en la lando, ĝis kiam li sukcese povos atingi la monon. Alie, li sciigis pri sia deziro reveni en Alĝerion post la ricevo de tiuj 270.000 eŭroj. Ĝis tiam, la bileto troviĝas en la prokurorejo de la urbo *Brugge*.

# LA GRAVA ROLO DE LA BOSPORA MARKOLO EN LA NUNTEMPA MILITO UKRAINIO - RUSIO

La nuntempa agres-milito de Rusio kontraŭ Ukrainio kaj la ĵusa sinko de la rusa milit-ŝipo "Москва" [Moskva] en la Nigra Maro, atentigas nin pri la reguligo de ĉi tiu maro en la internacia juro. La Nigra Maro estas interna maro inter sudorienta Eŭropo kaj okcidenta Azio, kiu limas inter Eŭropo, Anatolio kaj Kaŭkazo, ĉe la bordoj de Rusio, Ukrainio, Rumanio, Bulgario, Turkio kaj Kartvelio.




La sola enirejo en tiun maron troviĝas en la Bospora Markolo (**O** sur la apuda landkarto). Ĉi tiu markolo, kiu dividas la turkan urbon Istanbulon, interligas la Nigran Maron kun la Marmora Maro. Ambaŭ flankoj de tiu markolo estas turkaj teritorioj. Do, verdire, Turkio posedas la necesan ŝlosilon por permesi la eniron, aŭ ne, de ŝipoj en tiun maron.

Pro la fakto, ke temas pri regiono kie okazis, kaj bedaŭrinde nun okazas, disputoj kaj militoj pro la interveno de diversaj potencoj, en la jaro 1936 oni decidis redakti traktaton, rilate la trapason de ŝipoj tra tiu markolo.

Kiel dirite, la Traktaton de Montreux oni subskribis en la jaro 1936. En tiu dokumento oni certigas la tutan suverenecon de Turkio super la Marmora Maro kaj la Bospora Markolo, samtempe oni reguligas la liberan ŝip-trafikon tra tiuj akvoj.




Laŭ la traktato, la Bospora Markolo estas konsiderata kiel internaciaj akvoj, tiel, komercaj ŝipoj ĝuas liberan travojon dum paca epoko. Turkaj aŭtoritatuloj nur rajtas fari sanitaran inspektadon aŭ sekurecajn kontrolojn, tamen, ili ne rajtas malebligi liberan trairon.  Kaj kio okazas rilate al milit-ŝipoj?

Por klarigi pli bone ĉu milit-ŝipoj rajtas trapasi tiun markolon, ni proponas jenan skemon:

**A) Trapaso de milit-ŝipoj dum paca epoko:**

• ĉiuj milit-ŝipoj rajtas trapasi la markolon, kondiĉe, ke ili informos pri la trapaso kun anticipo de almenaŭ 8 tagoj, se temas pri milit-ŝipo kun flago de unu el la ŝtatoj  ĉe la Nigra Maro (Rusio, Ukrainio, Rumanio, Bulgario aŭ Kartvelio); aŭ 15 tagoj, se temas pri milit-ŝipoj de aliaj ŝtatoj.

• Milit-ŝipo pezanta pli ol 15.000 tunoj ne rajtas trapasi. Same, ne pli ol 9 milit-ŝipoj povas aniĝi en la sama eskorto.

• Milit-ŝipoj de ŝtatoj kiuj ne apudas al Nigra Maro ne rajtas resti ene de tiu maro pli ol 21 tagoj.

**B) Trapaso de milit-ŝipoj dum milita epoko:**

Unue, oni devas diri, ke Turkio estas la sola ŝtato kiu decidas ĉu okazas milito aŭ ne. Tiel, depost la jaro 1936 Turkio konsideris, ke ekzistis milita stato en la regiono de la Nigra Maro nur okaze de la Dua Mondmilito kaj nuntempe, okaze de la milito inter Rusio kaj Ukrainio.

Tiel, se okazas milito, ni devas distingi ĉu en tiu ebla milito partoprenas Turkio, kiel militanta partio, aŭ ĉi tiu ŝtato restas neŭtrala:

**B1) Turkio partoprenas en la milito:**

Ĉi-kaze, Turkio tutlibere povas disponi pri kiuj milit-ŝipoj rajtas trapasi la markolon. Same, Turkio ankaŭ rajtas malfermi la markolon al komerc-ŝipoj kun flago de ŝtato militanta kontraŭ Turkio.

**B2) Turkio restas neŭtrala en la milita konflikto:**

• milit-ŝipoj militantaj, kiuj apartenas al unu el la ŝtatoj ĉe la Nigra Maro ne povas trapasi la markolon, escepte se ili revenas en la havenon, kie ili estis enregistritaj. Ceteraj kondiĉoj daŭre validas, tio estas, 8-taga antaŭ-informo, ne pli ol 15.000 tunoj kaj ne pli ol 9 milit-ŝipoj.

• Milit-ŝipoj de ŝtatoj militantaj, kiuj ne apartenas al unu el tiuj ŝtatoj, ne rajtas trapasi la markolon.

• Milit-ŝipoj de ŝtatoj ne militantaj rajtas trapasi la markolon, sub egalaj kondiĉoj al tiuj de la trapaso dum paca epoko: 15-taga antaŭ-informo, ne pli ol 15.000 tunoj, ne pli ol 9 milit-ŝipoj, ne-restado en la Nigra Maro pli ol 21 tagoj.

Kompreneble, ĉi tiuj reguloj nur rilatas al tiuj ŝipoj celantaj trapasi la Bosporan Markolon, ne al tiuj, kiuj jam troviĝas ene de tiu maro kaj ne deziras eliri el ĝi, do, ili ne trapasos la markolon.

Aplikite al la nuntempa milito inter  Ukrainio kaj Rusio, Turkio deklaris sin neŭtrala en la konflikto. Do, milit-ŝipoj de Ukrainio aŭ de Rusio povas trapasi la Bosporan Markolon nur, se ili revenas en siajn havenojn kaj se la pezo de ĉiu ŝipo ne estas pli alta ol 15.000 tunoj, do aviadilŝipoj ne povos trapasi ĝin. Milit-ŝipoj de aliaj ne-kombatantaj ŝtatoj, kiuj ne apudas al la Nigra Maro, povos trapasi la markolon nur se ili restas en tiu maro dum ne pli ol 21 tagoj.



# *Vorto de la Semajno*

**Apelacio:** Ago de tiu, kiu apelacias.

**Apelacii** (tr)**:** Alvoki al supera tribunalo kontraŭ verdikto de pli malsupera instanco.

**Apelacia Kortumo**: Juĝinstanco de supera nivelo, kiu decidas pri apelacioj prezentitaj kontraŭ verdiktoj de malsuperaj juĝaj instancoj.

**Apelacianto:** Partio en la juĝa proceso kiu prezentas apelacion antaŭ supera kortumo.

Sinonimoj**:** *revizio, reklamacio.*




Apelacia Kortumo en Valparaíso (Ĉilio)

**GRAVA INFORMO POR MEMBROJ AŬ SIMPATIANTOJ DE IJEA, KIUJ PROFESIE AGADAS KIEL ADVOKATOJ.**

Dum la venonta Universala Kongreso de Montrealo, oni informos pri la baldaŭa fondiĝo de **UIAE -Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj-.** Temas pri nova asocio kie renkontiĝos ĉiuj advokatoj kiuj parolas aŭ simpatias la internacian lingvon. Ne temas pri konkuranta asocio kun nia IJEA, pro la fakto ke IJEA rilatas al juristoj, el ĝenerala vidpunkto, ne nur al tiuj kiuj profesie agadas ĉe juĝaj instancoj kiel advokatoj. Kompreneble, ambaŭ asocioj kunlaboros kiel eble plej efike. Pliaj informoj pri UIAE ĉe uiaeesperanto@gmail.com